

Du aliaj prelegoj

Tradukado: ĉu arto aŭ tekniko?

Ĵak Le Puil eble pli konata en la Eo-medioj kiel kantisto aŭ kiel ĉefredaktoro de la ajnista gazeto, ankaŭ rolas ne malgrave sur la literatura kampo, kiel tradukisto. Ja en tiu fako ne sole, sed ĉiam duope en nedisigebla paro kun sia edzino Armela LeQuint. Jam ampleksas la listo de iliaj tradukoj, inter kiuj troviĝas kelkaj «bravaĵoj» pro la slanga aŭ tre popola lingvo de la franca originala verko, kiel «La maljunulino kiu paŝas en la maro» de San Antonio, aŭ «Vojaĝo ĝis noktofino» de Céline, pro kiu ili ricevis la pritrudan OSIEKpremiion- kio ne estas bagatelo.

La prelego titolita «Tradukado: Ĉu arto aŭ tekniko?» (temos pri literatura traduko!) disvolviĝos laŭ ĉi plano:

- Unue: kial traduki?
- Due: kelkajn konsilojn al tradukonto (sed ege magraj!)
- Trie: ek al traduko!, kun legado far Armela kaj Ĵak de tradukeroj iliaj.
- Kvare: la kaptiloj.
- Kvine: konkludo (kiu ja tute logike troviĝas je tiu loko!).
- Kaj kompreneble debato...



Pri Klarneto

Eks-jazklarnetisto, Serĝo Sir' prezentos la klarneton, aŭ pli ĝuste, la familion «klarneto», unu el la plej multnombraj inter la muzikinstrumentoj. La prezento konsistos el rapida skizo de la historio, klarigoj pri la sonprodukto, priskribo de la materialoj uzataj, kaj difino de ĝia loko inter la aliaj muzik-instrumentoj. Laŭ tio ĉi, kion opinii pri la difino de «Klarneto» en la PIV, kaj ankaŭ de la aliaj muzikinstrumentoj. Serĝo ankaŭ prezentos kelkajn specimenojn el sia granda kolekto kaj kompreneble finos la paroladon per mini-koncerto.

La plej konata klarneto (Bb) inter la eta (Eb) kaj la giganta (kontrobasa Bbb).

Prepariĝu por efikaj laborgrupaj kunvenoj

Ĉi jare okazos du du-horaj laborgrupoj samtempe. Por ke ili estu plej fruktodonaĵ, nepras ke ili estu bone antaŭpreparitaj, do ni detale indikas ilian enhavon dezirante, ke plej multe el vi venu al la kunveno jam pripensinte la aferon, tiel ebligante fari konkretajn diskutojn pri jam antaŭredaktitaj projektoj.

1° Varbado (nova flugfolio, nova afiŝo, rebako de '1 huma, 1 langue'...)

Dum tiu ĉi laborgrupo, la partoprenantoj prezentos siajn ideojn kiam jam redaktitajn projektojn (sendu ilin jam nun al la komitato se eblas !) por nova flugfolio k nova afiŝo (la nunan varbmaterialeon kun temo 'internacia solidareco' vidu ĉe: <http://www.esperanto-sat.info/article1220.html>).

Alia varb-laboro fareda estas rebako de la franclingva varb-broŝuro «Une humanité, une langue» kiu celu montri praktikan utilon de esperanto k SAT-movado.

2° Regionaj delegitoj... Respondecoj por la franclingva suplemento de La SAGO

Tiu ĉi laborgrupo celas difini en kio precize konsistas la tasko de la regionaj delegitoj.

- Kolekti kaj teni ĝisdatigitajn informojn pri la stato de la Esperanto-movado (grupoj, kursoj, ktp...)
- Kolekti informojn pri lokaj iniciatoj en progresemaj medioj
- Peri por kontaktoj kun la libroservo de SAT-Amikaro, interalie por raciigi la grupajn mendojn, kaj organizi la lokan disdonadon de la SAT-Amikaraj varbiloj
- Raporti pri la lokaj iniciatoj
- Krei lokajn grupojn
- Organizati SAT-Amikaran kongreson...

Kompreneble, ĉiu delegito agas laŭ siaj eblecoj; tiu listo nur entenas proponojn. Vi povas agi ankaŭ skipe, ne necesas esti unu nura delegito en ĉiu regiono.

Informoj kolektitaj de la delegitoj nutru interalie la franclingvan suplementon de La Sago en ties parto «Ça bouge partout», kiu bezonas respondeculo(j)n. La laborgrupo ankaŭ celas difini la taskon de tiu(j) respondeculo(j), simplan, ne malfacilan sed tamen nepre necesan.

Malfermitaj pordoj kaj Malfermiĝo por Gravuloj

Sabaton posttagmeze la kongresejo estos malfermita al ĉiuj, kiuj deziras malkovri esperanton. Robert Lloancy akceptos la komencantojn por enkonduki pri nia ŝatata lingvo. Poste, je la 15a, ni invitos la Gravulojn (Urbeŝtrinojn, deputitojn, ...) por ceremonio. Esperante, ke ili venos! Sekvos honorvino por la kongresanoj kaj la Paŭanoj.

Klerigosio pri asocia kontado

Dimanĉon posttagmeze, nia K-do Guy Martin enkondukos tiun laborgrupon, kiu certe helpos konkrete la esperantistojn por la vivo de lokaj asocioj.

Kongres-telefono

Ek de nun la OKK estas kontaktebla per telefono. Tiu numero funkcios dum la kongreso. Tiel vi ĉiam povos kontakti iun respondeculon, ekzemple se vi bezonas helpon por iri al la kongresejo de la stacidomo, ktp.

Do, kunportu ĝin kun vi en Paŭo :

06.83.64.14.95

Kongresa stampilo



Ĉar estas tradicio de la Esperantistaj kongresoj, la OKK ne hezitis kaj eldonis verdan kongresstampilon.

... a deziro de la kongresanoj la paŭajn poŝtkartojn, la kovertojn, ktp. Ĉu burokrata frakcio ?

Jam 113 Aliĝintoj (2a listo)

78 ECHAPPE Lucette 44 Rezé, 79 LACHASSAGNE Daniel 03 Domerat, 80 FERRE Bruno 33 Cenon, 81 LLOANCY Robert 64 Pau, 82 BETEAU Robin 65 Frechendets, 83 MESLIN Bernard 64 Pau, 84 BOUMAN Arie 34 Portiragnes, 85 BOUMAN VANDENMEERS SCHAUT Marlène 34 Portiragnes, 86 RIGAUET André 22 Plouezec, 87 RIGAUET Louise 22 Plouezec, 88 LE BRIZAUZ Jean Louis 37 Tours, 89 LE BRIZAUZ Denise 37 Tours, 90 BOURLLOT Carlo Italio Turin, 91 GAUMÉ Jacques 37 Chanceaux sur Choisille, 92 GAUMÉ Marie-France 37 Chanceaux sur Choisille, 93 CAMY Guy 64 Oloron Ste Marie, 94 CHAMPION Nicole 44 St Lumine de Coutais, 95 BRANCO Paulo Belgique Bruxelles, 96 ANICIENE Diamante Belgique Bruxelles, 97 MARTINEZ Isabelle 16 Angouleme, 98 SCHNEIDER Jean -Pierre 13 Estrancrose, 99 SCHNEIDER Françoise 13 Estrancrose, 100 LJO 47 Villeneuve sur Lot, 101 BENOIST Fabrice 64 Pau, 102 GONET-BOISSON Gérard 64 Lucq de Béarn, 103 VONAY Josette 78 Sartrouville, 104 BOUCHET Rémy 86 Champniers, 105 GOSSET Timour 65 Bagnères de Bigorre, 106 DARJO Céline 65 Bagnères de Bigorre, 107 CAVALIER Guy 93 Epinay, 108 BICHON Véronique 34 Béziers 109 HARIR Samia 31 Toulouse 110 VIDOTTO Christine 31 Toulouse 111 NOULIN Danielle 41 Lunay 112 NOULIN Marcel 41 Lunay 113 HUSSE J e a n - Louis 64 Nay - Bourdettes

Sabate vespere, ĉu vi venos pedal-aŭte ?



Ni ne anoncis ĝin ĝis nun, ĉar ĉio estis tro malcerta. Sed nun, ĉio en ordo, la koncerto de Jacques Yvart okazos en la urba kinejo «Art et essai» («Arto kaj provo») «*Le Méliès*». Kaj, interese, ĝi antaŭos filmvidigon de «El coche de pedales» («la pedalaŭto»)

Ĉi vespero, kiel la du aliaj, akceptos la urban publikon. Ne temas pri vespero organizita de l' kongreso mem, sed en kunlaborado kun la kineja asocio. Pro tio, ĝi ne estos senpaga, krom por la kongresanoj.

Evidentas ke tia kunlaborado, laŭ specifeco kaj graveco, konsistigas bonan progreson por la Esperanta bildo, des pli ke la akompananta filmo freŝdatas kaj bonkvalitas.

Tiu filmo ricevis la premion «Coup de cœur» («subita korinklino») de la festivalo Cinespaña (Hispan-kino),

Temo (Laŭ Vikipedio)

En Hispanio, dum Paska semajno de 1959, infano *Pablito* («Paŭlĉjo») deziregas kostegan pedalaŭton, kiun li vidis en ludilvendejo. Lia patro *Pablo* estas instruisto pri tajpado kaj Esperanto, el maldekstremaj venkita familio. Li estas malsukcesulo, kiu mensogas kaj prokrastas ŝuldojn. Liaj lernantoj preferas transŝosean lernejon, kie oni instruas la pli praktikan francan.

La filmo montras impresoj, kiel oni vivis dum mezo de regado de *Francisco Franco*.

Pablo krom instrui ankaŭ renkontiĝas kun esperantistaj maldekstremaj konspirantoj, kaj tial multaj esperantaj frazoj (salutoj, proverboj) estas aŭdeblaj kaj legeblaj.

Organizado de tia vespero, krom la neceso konvinki la kin-asociacion, entenis multajn malfacilaĵojn. Necesis trovi filmon pri Esperanto, aŭ kun rilatoj kun Esperanto, kongruan kun la kriterioj «Arto kaj Provo», sed plie haveblan sub tradicia filmformo («*Le Méliès*» ne uzas video-formon) kaj kies vidig-rajtoj disponeblas. Ni vane serĉis.

Neniu franca agentejo disponigas «El coche». Per reto, ni fine trovis agentejon en Hispanio, kiu povis disponigi ekzempleron kun subtekstoj en la franca, el la kin-instituto de Madrido. Dank' al Jose Maria Lara, produktoro de la filmo, ni fine sukcesis ĝin enprogramigi.

Pri niaj spertoj kaj kontaktoj, ni evidende pretas profitigi la asociojn kiuj ŝatus organizi samspecan «kino-koncerton» en la arto-kaj-prova kinejo de siaj urboj, la precedenco de la paŭa vespero konsistiganta konvinkilon por la kinejaj respondeculoj.

Provizora programo

Kompreneble nia kongreso okazos nur post unu monato. Ĉio ankoraŭ ne estas definitiva, kvankam pri la programo, ĉio estas preskaŭ certa.

SABATON

FEI-Ekzamenoj
Ekde la 9a: Akceptado en la mateno:
Parolado pri klarnetoj far Sir' Ekzamenoj, 1a kaj a grado
Je la 12a00 : Tagmanĝo
14a : Ekzamenoj plu.
Inicado al Esperanto
Malfermaj pordoj
13a30-15a : Vizito de la kastelo (1a grupo)
15a : Oficiala malfermo
15a45 : Honorvino
17a: Prelego *Jules Verne, espérantiste*
19a00 : Vespermanĝo
20a40 , en kinejo *Le Méliès* :
o Koncerto de Jacques Yvart
o Filmo "El coche de pedales"

DIMANĈON

9a : Unua laborkunsido
11a30 : Grup-fotado
12a : Tagmanĝo
13a45-15a45 : laborgrupoj :
o Varbado (nova flugfolio, nova afiŝo, rebako de 'une humanité, une langue'...)
o Franclingva suplemento de La SAGO, regionaj delegitoj...
15a45 : Vizito de la kastelo de Paŭo (2a grupo)
17a30 : Prelegoj
o Tradukarto (Ĵak Le Puil)
o Esperanto kaj hispanaj rifuĝintoj dum la intercivitana milito (Robert Lloancy)
18a45 : Vespermanĝo
20a45 , en la Teatro Sankta-Ludoviko
o Teatraĵo : "La Grandioza Kongreso" (C. Vidotto kaj S. Harir)
o 21h15, koncerto : Kaj Tiel Plu

LUNDON

9a-11a45 : Lasta laborkunsido
11a45 : Prezento de la venonta SAT-Kongreso okazonta en Milano
12a30 : Tagmanĝo
14a : Ronda tablo pri Kien la E-vortaroj de la Franclingvanoj ?
15a30 : Gustumado de Ĵurasona vino
16a : Plano B 3.0 (R. Beto)
17a : Klerigsesio pri asocia kontado (Guy Martin)
17a : Prelegoj de Jomo
o Unuaj paŝoj en la gaskona lingvo kaj la okcitana muziko
19a30 : Vespermanĝo
21a, en la teatro «Monte-Charge» :
o Koncerto kaj fabelo : Ljuba (Vera Girard kaj Jomo)

Propagandi por Esperanto

Nia kongreso entenas gravan kulturalan programon.

Unu el niaj celoj estas agi por Esperanto per la kongreso. Do ni provos havi multajn partoprenantojn kiuj ankoraŭ ne parolas Esperanton.

Pro tio, ni eldonis 1000 afiŝojn (formato A3) kaj 6000 flugfoliojn. Ni disdonos ilin en nia departemento. Asocioj kiuj deziras havi kelkajn ekzemplerojn, sendu al ni simplan demandon, kun A4-koverta kun adreso, jam afrankita (0,89€ por 100 gramoj) .



Lastminute n°1 : ni ĵus ricevis konsenton de la Paŭa estraro por ke flirto esperantaj flagoj de la 1a ĝis la15a de aprilo ĉe la urbodoma fasado.

Lastminute n°2 : ni ricevis konsenton ankaŭ por havi afiŝlokojn en bushaltejoj. Pres-kosto estos sufiĉe impona, sed afiŝlokoj de 1,20 m x 1,75 m ja ebligas efikan vidigon por Esperanto.

Lastminute n°3 : La vendreda rendezuo por la Bankedo okazos je la 20-a rekte en la restoracio ĉe Laurette (Place du Foirail).